

Legantoleteroj

pri la artikolo "Vera pensmaŝino" (SR 4/2010, p. 195-204)

Kun intereso mi legis la artikolon pri la pensmaŝino. Teorie mi konsentas, ke la interna prilaboro de la menso ene de la cerbo, same kiel en komputilo, supozeble sekvas ĝeneralan internan meĥanisman. Nur je la alprenado kaj eldono la informoj estus transformataj en la formon de parolebla lingvo. Aparta afero ja estas la vegetativa sistemo, kiu ne uzas paroleblan lingvon, kaj tial reagis pli rapide kaj senkonsciencie. La noveldonita, esperantigita libro de *Noam Chomsky* "Lingvo kaj Menso", eldonita de UEA, ja diskutas tiun aferon detale. Estus fenomenata atingo en la historio de aŭtomata tradukado, se la prezentita per-neŭrona enpakigo de informoj povus funkcii eĉ je tiaj kompleksaj rilatoj, kiel en politiko kaj diplomatio. Ili ja ofte ofte estas komunikataj kaj sur diversaj niveloj kaj "inter la linioj", t.e. ne-ekte. La provo enprogramigi tion estus valora ĉiukaze kiel heŭristika perceptogajno, do fundoscience. Je legado de la artikolo mi trovis nur unu erareton: "arta inteligenteco". Devus esti: "artifika ..", ĉu ne? "Arta inteligenteco" ja montrus eble al la inteligenteco de artisto en sia fako. Supozeble temas pri Esperanto-tipa eraro, pro tro proksimaj radikoj simile je: ventilo & ventumilo, kaj volumo & volumeno, ktp.

<Manfred@westermayer.de>

Unue mi devas diri ke mi estas matematikisto, sed funda prijuĝo de la artikolo postulas konojn pri la labormaniero de la cerbo, kiujn mi ne havas. Spite al tio, mi povas diri ke en la komenco ĝi estas sufiĉe agrabla legaĵo, kvankam popularscienca, ne scienca. Poste la verkstilo fariĝas abstrakta (ni diru ekde la sekcio 6) kaj la aŭtoro ne sufiĉe konkrete priskribas, kion oni fakte faris. Se la aŭtoro povus reverki tiujn sekciojn kun pli da konkreta priskribo pri la laboro farita, estus bone. Finfine, la eldiro "Certe ankaŭ la senproblema traduko de iu ajn libro estus bagatela facilajo" (paĝo 8) sonas kiel senbaza fanfaronado. Kaj "Rezulte ni havus komunan mondlingvon [...]" ŝajnas esti sciencfikcia. Pro tio oni perdas la fidon.

<kiselman@math.uu.se>

La realigo certe estus granda paŝo en direkto de transfero de pensoj kaj imagoj en buŝan kaj skriban formon, ankaŭ tradukado en aliajn lingvojn kaj renverse. Ĉu tio ankaŭ eblus por kulturoj kun tute diversaj pensad- kaj imagstrukturoj? Krom tio vera pensmaŝino devus havi la kapablecon tiri konkludojn kaj fari decidojn. Ĉu tio entute estas dezirinda? Decidoj sen konscienco kaj etiko sole laŭ la leĝoj de la naturo?

<SiegfriedSchweiger@freenet.de>

Recenzo**La mondo laŭ la vidpunkto de leopardo**

Recenzo el *MONATO* (aŭg/sep 2007) pri la libro

Ĵim' la migrulo

– Aventuroj de juna leopardo –

KAVA-PECH, Anglická 878, CZ – 252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio 2007,
ISBN 978-80-85853-92-6, € 13.80

verkita de *Siegfried Stampa*,
elgermanigis *Rüdiger Sachs*,

lingvaĵe kontrolis *Josef Kavka* kaj *Rob Moerbeek*

Ĉi tiu tre bonaspekta libro estas riĉe ilustrita, per naivstilaj desegnaĵoj, faritaj de la aŭtoro. La libro precipe celas infanojn, mia-konjekte ĉirkaŭ 13-jaraĝajn. Havante la formon de romano, la verko ankaŭ celas instrui. Verkis ĝin specialisto pri kampara bestkuracado. La loko de la romano estas Sud-Afriko. La bestaro, menciita en la rakonto, estas sud-afrika, do valoras havi ĉemane vortaron por konatiĝi kun ili, ĉar plejparte iliaj nomoj ne estas konataj al eksterafrikano. La romano estas facile legata, kun klara stilo, kaj la traduko estas senpeka. Ankaŭ la kompostokontrolo estas tre zorge farita; se enestas presezaroj, mi ne trovis ilin.

Per la vivospertoj de nove naskita, kaj frue orfigita, sovaĝa leopardo Ĵimo, ni lernas ne nur pri la pejzaĝo sud-afrika kaj la sentoj kaj bezonoj de rabobesto, sed ankaŭ pri multaj danĝeroj, kiujn alfrontas tia besto. Inter tiuj danĝeroj estas ne nur la minaco de aliaj rabobestoj, sed ankaŭ la problemoj eviti homojn. Leopardoj estas protektata specio, sed bienuloj emas forgesi la leĝojn, rilatantajn al tiu fakto. Disŝutitaj tra la romano estas nelongaj skizoj pri apartaj familioj homaj, kiuj penas vivteni sin per paŝtado de "dombestoj" (ŝafoj, kaproj, bovoj k.c.), kiujn amas ataki kaj vori ne nur la leopardoj, sed ankaŭ diversaj aliaj rabobestoj sovaĝaj. Ankaŭ la ĉie uzata homprotektanto, la hundo, estas bongusta frandaĵo por sovaĝa besto.

Ni trovas, ke la deziro protekti "endanĝeritajn" sovaĝajn speciojn estas laŭdinda, sed ne ĉiam bone planita. En la lasta parto de la romano la aŭtoro konigas al ni la danĝerojn, kiujn povas prezenti

al rabobesto la vivo en boncela kaptiteco. La manko de taŭga manĝaĵo: la digestosistemo de sovaĝa leopardo evoluis, spertante iom putrajn bestokadavrojn, kaj ne ĉiu parto de morta besto estas egale nutra por sovaĝa leopardo. La provizado de nur freŝa viando efektive malsanigas Ĵimon, kiu resaniĝas nur post eskapo el la “protektita regiono”, kiun prizorgas boncelaj homoj. Ankaŭ la manko de senlima libero vagadi kaj trovi naturajn kaŝlokojn por tranoktado aŭ por naski kaj varti idojn povas endanĝerigi kaj la korpan kaj la psikologian sanon de la rabobesto.

Aliflanke, la bezonoj de la homoj, klopodantaj vivteni sin, bredanta bestojn kaj kreskigante necesajn vegetaĵojn por la homa nutrado, konflikta kun la vivbezonoj de la sovaĝaj bestoj. Ĉu ekzistas eblo solvi tiun dilemon? La aŭtoro, per sia tre hom-

kaj bestama detaligo de la ivo en tiaj regionoj, tre klare montras al ni la naturon de tiu dilemo. Ĉu vivanto renkontas gravajn, kaj ne ĉiam supereblajn, problemojn. Ni ne tro idealisme imagu, ke la paca kunekzisto estas fundamenta parto de la naturo. La naturo estas tiom pereiga, kiom vivefika.

Kvankam valora kaj ĝudona romano por infanoj, ankaŭ por plenkreskaj homoj la verko taŭgas. Ne atendu kutiman avonturromanon, plenan de ekscitaj, sed malfacile kredeblaj eventoj. Sed ja atendu tre versimilan priskribon de la reala vivo, kiel



ĝin spertas realaj vivantoj. Kaj pretu etendi la varmon de via koro kaj alo sovaĝa besto, penanta vivteni sin en danĝeroplana medio, kaj al la homoj, kiuj simile penas vivteni sin en egale danĝeroplana medio:

Verko rekomendinda por serioza leganto, ĉu infana, ĉu aĝe post-infana.

Dr. Donald Broadribb
59 B, Lukin St.

Beverley, WA 6304 / AŬSTRALIO

Scienca eĥo

Fonto de la scienceĥaĵoj: la datoj (en krampoj) estas la cititaj ŝirfolioj de Brockhaus-kalendaro “Kion tiel ne diras la leksikono”

Fiŝtranĉiloj

En antaŭaj tempoj la manĝotranĉiloj estis farataj el malaltkvalita ŝtal-aloyo, kiu alikoloriĝis post ekkontakto kun certaj nutraĵoj. Eĉ pli malbone: ankaŭ la gusto fariĝis tre malagraba. Reagis terpomoj, ovo, asparago kaj fiŝo. Tiuj surtablaĵoj ricevis “tranĉil-malpermeson” en la geneologia arbo resp. en la tiam oficialaj mastrumadkuirejaj libroj, kiu ankoraŭ hodiaŭ fantomas tra la manĝokutimoj. Kvankam ĝi intertempe estas tute superflua pro la novaj manĝilar-metaloj.

Specialaj fiŝtranĉiloj ekaperis nur meze de la 19-a jarcento. Ili konsistis el altkvalita arĝento kaj ilia formo rezultis el tiu ĉi materialo, ĉar arĝenton oni ne povas akriĝi. Ke la fiŝtranĉiloj estas malakraj ja tute ne gravas dum la dispecetigo de mola fiŝo. Kaj kiel oni sin provizore helpis antaŭ la invento de fiŝtranĉiloj? Tiam la fiŝo estis disŝirita per du forkoj. Tio tre facile funkciis, ĉar tiam (kaj ankoraŭ hodiaŭ) la fiŝoj estis tiom longe kuiritaj, ke ili disfalis per si mem.

(2009-12-30)

Alumetskatolaj aŭtomobiloj

Lesley Smith kaj Rodney Smith (ne fratoj, sed amikoj el la lerneja tempo) fondis en la jaro 1947 en Edmonton (proksime de Londono) la firmaon “Leslejaj Produktaĵoj” (“Lesley Products”). La entrepreno celis produkti gisaĵojn, sed ne faris bonajn negocojn. Pro tio oni produktis ekde 1948 zink-muldaĵajn (infanajn) ludilojn, en 1952 tre sukcesan modelon de la kronadceremonia kaleŝo de la reĝino Elizabeth la Dua.

Ekde tiam la Lesleja Produktofirmao prosperis – danke al brila ideo, kiu baziĝis sur la scio pri la britaj lernejo-reguloj: la infanoj ne rajtis kunporti en la lernejon iun ajn ludilon pli grandan ol alumetskatolo (angle “matchbox”). La unuaj modeloj estis vaporulilo, basen-baskulkamiono kaj cement-miksilo. Jam ekde 1956 oni eldonis serion de antikvaj aŭtomobilmarkoj (angle “Oldtimer”) por kolektantoj. En la 1970-aj jaroj, la Leslej-firmao ankoraŭfoje fanfaronis per “Superrapid-modeloj” kun senrajpe glataj aksoj.